


Aleksander Korĵenkov

Fjodor Dostojevskij en Esperanto



SED NE EL KATEDRO. N°2

Aleksander Korĵenkov

***Fjodor Dostojevskij
en Esperanto***

Ĉi tiu libro estas elŝutita el la
Kiosko de Sezonoj

<http://esperanto.org/Ondo/Libroj/Libro.php>

Antaŭparolo

Ĉi tiu prelego estis unuafoje prezentita la 15an de julio 2002 en la lanĉo de la *Blankaj noktoj* kadre de la 1a Balta Esperanto-Forumo en Kaliningrado. Poste ĝi estis legita en Poznano (Pollando), Glasgovo (Skotlando), Kaŭno kaj Birŝtonas Litovio), kaj en Sabadell (Katalunio). Ĝi aperis, iom reduktite, en *La Brita Esperantisto* (aŭtuno 2003, N°955).

En 2005 la prelegoteksto estis eldonita broŝur-forme kiel la dua kajero en la kleriga serio *Sed ne el katedro*. La broŝura teksto enhavis ĉiujn citaĵojn, kiuj mankis en la formo gazeta (pro lokomanko), kaj en la prelego (por ne lacigi la aŭskultantojn). Mi enmetis aldonajn frazojn por respondi demandojn, kiujn oni faris post la prelegoj. Ekzemple, en la prelego temas nur pri literaturo, sed ĉar aŭskultantoj ĉiam demandis pri la vivo de Dostojevskij, precipe pri la aresto kaj “ekzekuto”, mi enmetis en la komencon de la broŝuro iom reverkitan tekston el mia komentario al *Krimo kaj puno*. Ĉe pretigo de la nuna elektronika eldono mi aldonis al la komenca parto kelkajn pliajn frazojn.

Same kiel ĉiuj eroj de la serio *Sed ne el katedro*, ĉi tiu eseo estas kleriga, neniel scienca. Ĝi nur celas rakonti al la ĝenerala esperantista legantaro (ne al literaturologoj kaj kritikistoj) pri la ĉefaj vivoŝtupoj de Fjodor Dostojevskij kaj prezenti ĉefajn specifiaĵojn de la stilo de Dostojevskij kaj ilian transdonon en Esperanto.

Aleksander Korĵenkov

la 23an de novembro 2011

Kaliningrado

Fjodor Miĥajloviĉ Dostojevskij (Достоевский) naskiĝis la 30an de oktobro (Gregorie: la 11an de novembro) 1821 en Moskvo. Tamen lia patro Miĥail Andrejeviĉ Dostojevskij ne estis naskita en Moskvo; li devenis el la familio, kies historio estas longa kaj interesa.

La unua dokumentita praulo de la aŭtoro de *La fratoj Karamazov* estis la tataro taĉmentestro Aslan Ĉelebi-murza, kiu en 1389 (naŭ jarojn post la rusa-tatarata batalo en la Kulikova Kampo) forlasis la Oran Hordon kaj venis en Rusujon por servi al Demetrio la Dona, Granda Princo Moskva. La tataro armeano estis ortodokse baptita kiel Prokopij, li geedziĝis kun Maria Ĵitova, filino de Zotik Ĵitov (nobelo el la kortego de Demetrio la Dona) kaj ricevis en posedon la urbeton Kremeneck. Lia filo Lev havis grandan buŝon kaj pro tio li ricevis la kromnomon Rtiŝĉev (de la rusa vorto “por” = buŝo), kiu iĝis la familia nomo. La duonluno sur la blazono de Rtiŝĉev memorigas pri la tataro deveno de la familio.

En la mezo de la 15a jarcento Stepan Rtiŝĉev estis kortegano de la Serpuĥova princo Ivano Jaroslavido. En 1456 princo Ivano forlasis la flankon de la Granda Princo Moskva, Bazilo II la Blinda, kaj fuĝis kun sia kortego kaj armeo al la Granda Princlando Litova, Rusa kaj Ĵemajta — Litvo. En Litvo Ivano iĝis princo en Pinsko (nun en Bresta regiono, Belarusio), kaj li donacis al Stepan Rtiŝĉev du vilaĝojn.

Kvindek jarojn poste, la 6an de oktobro 1506 la Pinska princo Teodoro Jaroslavido (filo de Ivano), donacis al Danila Rtiŝĉev parton de la vilaĝo Dostojevo en la Pinska distrikto. Laŭ la nomo de ĉi tiu vilaĝo Danila Rtiŝev forlasis sian antaŭan nomon kaj iĝis Danila Dostojevskij.

Posteuloj de Danila Dostojevskij forveturis al Volinio, al Podolio, al Litovio, al Pollando kaj al aliaj regionoj; parto de la familio iĝis romkatolika, sed ni ne traktu la genealogion detale kaj tuj saltu preter pluraj generacioj kaj familiaj branĉoj al la jaro 1809a, kiam la 20-jara Miĥail Andrejeviĉ Dostojevskij el la vilaĝo Vojtovcy en Podolio (nun en Vinnica regiono, Ukrainio), kie lia patro Andrej estis pastro, forlasis la Podolian seminarion kaj aliĝis al la Moskva filio de la Imperiestra medicina-kirurgia akademio. En aŭgusto 1812, post la invado de la Napoleona armeo, Miĥail Dostojevskij iĝis arma kuracisto kaj, post kelkaj oficoŝanĝoj, en majo 1819 ekservis kiel kuracisto en la Moskva arma hospitalo, kaj baldaŭ poste kiel kuracisto en la fama “Maria” hospitalo por malriĉuloj, fondita kaj financita de la imperiestrino Maria Fjodorovna en la Moskva distrikto Boĵedomka. Ni aldonu, ke en 1828 Miĥail Dostojevskij iĝis Ruslanda nobelo, sed li konservis la rajton plu uzadi la Pollandan nobelan blazonon Radwan, ricevitan de la familio en 1577.

En 1819 Miĥail Dostojevskij geedziĝis kun Maria Neĉajeva, filino de la iam riĉa Moskva komercisto Fjodor Neĉajev, kies kapitalo grave ŝrumpis post la Napoleona milito. Ilia unuenaskito estis la filo Miĥail, naskita la 13an (la 25an) de oktobro 1820, kiu poste okupiĝis, interalie, pri verkado kaj gazet-eldonado. La dua filo Fjodor, kiel menciite en la unau frazo, naskiĝis unu jaron poste — la 30an de oktobro (la 11an de novembro) 1821.

La familia etoso estis klerema. Dum vesperoj oni laŭtlegis rusan kaj tradukitan beletron, historiajn kaj kristanajn tekstojn; dimanĉaj diservoj en la hospitala preĝejo de S-taj Apostoloj Petro kaj Paŭlo kaj vizitado de teatroj aldonis kulturalan fonon al la multinfana familio. Malgraŭ la limigitaj financaj rimedoj la patro sukcesis pagi la lernadon de Fjodor kaj de Miĥail en la renoma lernejo de Ĉermak en Moskvo.

Post la morto de la patrino pro ftizo (1837) la patro veturigis siajn du pliaĝajn filojn Miĥail kaj Fjodor el Moskvo al Peterburgo, kie komence de 1838 Fjodor Dostojevskij studentiĝis en la Ĉefa Inĝeniera Superlernejo, preparanta inĝenierojn por la armeo. En

1839 la patro estis mortigita fare de siaj propraj servutuloj en Tula gubernio.

En la inĝeniera lernejo Dostojevskij ekokupiĝis pri literaturo originale kaj traduke. Post la fino de siaj studoj kaj nelonga deĵoro en Peterburgo, li en oktobro 1844 leŭtenanto Fjodor Dostojevskij ekŝiĝis el la armeo. Lia sola okupo iĝis literaturo. Jam antaŭ la demisio en la junia kaj julia kajeroj de *Repertuar i Panteon* (1844) aperis lia traduko de *Eugénie Grandet* (Balzac).

En 1845 li verkis sian unuan romanon *Malriĉaj homoj*, kiu aperis en januaro 1846 en *Peterburga kolekto* — la dua almanako de la t. n. “naturalisma” skolo, inter verkoj de Vissarion Belinskij, Aleksandr Gercen (Herzen), Nikolaj Nekrasov, Ivan Panajev, Ivan Turgenev kaj aliaj.

Unu monaton poste aperis *Sozio en Oteĉestvennyje Zapiski* (La Patrolandaj kronikoj). Sekvis en la sama revuo *Sinĵoro Proĥarĉin* (1846), *Mastrino* (1847), *Blankaj noktoj kaj Malforta koro* (1848), *Netoĉka Nezvanova* (1849), kelkaj rakontoj kaj felietonoj.

Kvankam la sukceson de *Malriĉaj homoj* salutis la naturalisma skolo kaj Belinskij (pri tio legu poste), jam fine de 1846 Dostojevskij forlasis la “naturalistojn”, ne laste pro la kverelo kun Turgenev kaj Nekrasov, kiuj kune kun Belinskij forlasis la “nesufiĉe progreseman” *Oteĉestvennyje Zapiski* kaj daŭrigis sian linion en *Sovremennik* (Samtempulo). En 1847 li distanciĝis ankaŭ de Belinskij, laŭ kiu, liaj verkoj post *Malriĉaj homoj* estis nesufiĉe realismaj socie, tro romantismaj, fantastaj kaj “multevortaj”.

Post la malvarmiĝo de la rilatoj kun Belinskij, Dostojevskij proksimiĝis al la socialisma rondeto de Miĥail Butaŝeviĉ-Petraŝevskij, kiu bazu sin sur la ideoj de Fourier. La rondeto aktiviĝis en 1848 pro la revoluciaj eventoj en Francio, kaj ĝian radikalalan alon ekgvidis Nikolaj Speŝnjov. Miĥail kaj Fjodor Dostojevskij frekventis ĝiajn kunvenojn. La 23an de aprilo 1849 estis arestitaj pli ol tridek rondetanoj, inter kiuj ankaŭ Dostojevskij. Li estis akuzita pri disvastigo de la malpermesita letero de Belinskij al Gogol kaj pri plano fondi kontraŭleĝan presejon.

La 13an de novembro 1849 la armea juĝo anoncis la verdikton. Mortkondamnitaj estis Petraŝevskij kaj dudek liaj grupanoj, inkluzive de la la aŭtoron de *Malriĉaj homoj* kiu estis kondamnita “pro nedenuco de la disvastigo de la krima letero de literaturisto Belinskij, direktita kontraŭ la religio kaj la ŝtato...”. La 19an de novembro pli alta instanco General-Auditorat anstataŭigis la mortkondamnon per okjara bagnado. Nikolao I eĉ pli mildigis la verdiktojn, sed ordonis anonci tion nur post la publika anonco de la mortverdikto kaj okazigo de la tuta ekzekuta ceremonio escepte de la pafado. Laŭ la mildigita verdikto Dostojevskij estis kondamnita al kvarjara bagnado kaj posta soldata servado. La ekzekuta ceremonio, kiu okazis la 22an de decembro 1849, profunde impresis la junan verkiston. Samtage li skribis al sia frato Miĥail:

Sciu ke mi ne senesperigis, memoru ke la espero min ne forlasis <...> Ja mi estis hodiaŭ ĉe la morto, dum tri horkvaronoj mi vivis kun tiu penso, mi estis ĉe mia lasta momento kaj nun mi denove vivas! <...> La vivo estas donaco, la vivo estas feliĉo, ĉiu minuto povas esti jarcento da feliĉo <...> Nun, ŝanĝante mian vivon, mi renaskiĝas je la nova formo <...> Mi renaskiĝos pli bona. Jen estas mia tuta espero, mia tuta konsolo.

Survoje al Omsk Dostojevskij pasigis kelkajn tagojn en Tobolsk, kie lin kaj liajn kunulojn vizitis edzinoj de decembristoj, ekzilitaj al Siberio antaŭ pli ol 20 jaroj. Natalja Fonvizina (unu el la prototipoj de Tatjana Larina el la versromano *Eŭgeno Onegin* de Puŝkin kaj la ĉefa protagonistino de la neverkita romano *Decembristoj* de Tolstoj) donacis al li Evangelion, kaj li konservis ĝin dum la tuta vivo.

La 23an de januaro 1850 Dostojevskij kun Sergej Durov venis al bagnejo en la siberia urbo Omsk, kie ili pasigis kvar jarojn. Dum la ekzilo Dostojevskij bone konatiĝis kun la vivo de la rusa popolo en la sfero nekonata de ĉefurbaj nobeloj. En februaro 1854 li forlasis la bagnejon kaj ekservis en Semipalatinsk (nun en Kazahstano) kiel ordinara soldato.

Post la forpaso de Nikolao I (12 mar 1855) kaj ekregado de

Aleksandro II la vivo de Dostojevskij pliboniĝis — li fariĝis suboficiro, poste oficiro kaj rericervis sian nobelan staton. 6 feb 1857 li geedziĝis kun Maria Isajeva, vidvino de drinkema doganisto. En la aŭgusta kajero de *Oteĉestvennyje Zapiski* (1857) aperis lia *Malgranda heroo*, verkita dum la antaŭjuĝa aresto en 1849. En marto 1859 Dostojevskij duafoje eksiĝis el la armeo kaj revenis al Peterburgo post kelkmonata loĝado en la gubernia ĉefurbo Tverj, kies guberniestro Baranov kaj aliaj oficistoj poste reviviĝis en *Demonoj*.

Li revenis al la literatura vivo. Jam en 1859 estis eldonitaj *Sonĝo de onklo* kaj *La vilaĝo Stepanĉikovo kaj ĝiaj loĝantoj*. En 1861 aperis la unua numero de la revuo *Vremja* (Tempo), kies fondinto kaj formala redaktoro estis Miĥail Dostojevskij, sed la fakta redaktoro kaj ĉefa kunlaboranto — Fjodor Dostojevskij.

Dum neplenaj tri jaroj en *Vremja* aperis valoraj verkoj de Turgenev, Aleksandr Ostrovskij, Apollon Grigorjev kaj, unuavice, de Fjodor Dostojevskij mem: *Humiligitaj kaj ofenditaj* (1861), *Noticoj el Mortodomo* (1862) kaj multaj publicistikaj kaj kritikaj eseoj, en kiuj li defendis la doktrinon de la revuo, kiu estis bazita sur la tradiciaj rusaj kaj ortodoksaj valoroj, sur neakcepto de perforto kaj nihilismo, sur rifuzo de la klasa aliro.

La 24an de majo 1863 *Vremja* estis malpermesita. Nur komence de 1864 ĝi reviviĝis kiel *Epoĥa* (Epoko), sed ĝi aperis nur dum unu jaro. Fjodor Dostojevskij sukcesis aperigi en *Epoĥa*, interalie, sian novelon *Noticoj el la kelo*, per kiu li definitive forlasis socialismajn ideojn. Al ĉi tiu forlaso kontribuis ankaŭ liaj du restadoj en 1862 kaj 1863 (duafoje, kun lia amatino Apolinaria Suslova — la prototipo de Polina en *Ludanto* kaj de Nastasja Filippovna en *Idioto*) en Eŭropo, dum kiuj li seniluziĝis pri la burĝa Eŭropa vivmaniero, sed ankaŭ kutimiĝis al hazardludo (ruleto).

La 15an de aprilo 1864 pro ftizo mortis la unua edzino de Dostojevskij (ŝia sorto estis la bazo de Katerina Ivanovna Marmeladova en *Krimo kaj puno*) kaj la 10an de julio 1864 mortis lia frato kaj kunredaktoro Miĥail. Fjodor Dostojevskij surpronis

liajn ŝuldojn kaj baldaŭ frontis la mondon de kreditoroj, lombardistoj, uzuristoj kaj policistoj, kiun li respegulis en *Krimo kaj puno*, ekverkita aŭtune de 1865 kaj publikigita en *Russkij Vestnik* (La Rusa Heroldo) de Miĥail Katkov.

En oktobro 1866 li devis interrompi la laboron pri *Krimo kaj puno* pro la neceso urĝe plenumi la kondiĉojn de kontrakto kun la eldonisto Fjodor Stellovskij, laŭ kiu Dostojevskij devis liveri al li novan romanon antaŭ la 1a de novembro 1866. Verki kaj skribi romanon dum unu monato estis nereala entrepreno, sed Dostojevskij trovis solvon — la 4an de oktobro 1866 li ekdiktis al la komencanta stenografistino Anna Snitkina la romanon *Ludanto*, kaj la romano estis finita ĝustatempe. La 15an de februaro 1867 okazis geedziĝo de la romanisto kun la dudekjara stenografistino, kiu fariĝis lia fidela vivkunulino kaj ĉefa helpanto. Post du monatoj la novgeedzoj forveturis el Ruslando, kien ili revenis nur post pli ol kvar jaroj en julio 1871.

En Germanio, Svislando kaj Italio Dostojevskij laboris pri du romanoj. *Idioto* estas lia plej lirika romano, kies protagonisto personigas la kristanajn ideojn de boneco, frateco kaj karitato. Sed tiujn virtojn ne havas la centraj figuroj de *Demonoj* — pamfleto kontraŭ la socialismaj ideoj, kies adepto Dostojevskij estis en la juneco.

En 1873–1874 Dostojevskij fariĝis redaktoro de *Graĵdanin* (Civitano), modere konservativa revuo, en kiu li regule aperigis *La taglibron de verkisto*, kiu poste aperis kiel aparta revuo, kun kelkaj paŭzoj, ĝis lia morto.

Ĝi estis senprecedenca evento en la Ruslanda soci-kultura vivo. En la *Taglibro* la intereso al la aferoj de socio kaj moralo estas tre vastgama: reformoj en Ruslando, krizo de la intelektularo, ekspluatado de infanoj kaj virinoj, klerigo, Balkana milito, katastrofoj kaj krimoj, suicidoj, drinkado, socialismaj ideoj, filozofio, Ruslando kaj okcidento, literaturo, kaj ĉiutaga vivo kun ties ĝojaj kaj tristaj momentoj... La postforma Ruslando aperas antaŭ ni en la stilo unika, tipa de Dostojevskij, plena da paradoksoj, humuro kaj kontraŭdiroj.

Malgraŭ la opozicio al la demokratia skolo, Dostojevskij akceptis la proponon de Nekrasov aperigi sian romanon *Adoleskanto* (1875) en *Oteĉestvennyje Zapiski*, kies eldonanto Nekrasov fariĝis en 1868. Tamen lia lasta romano *La fratoj Karamazov* (1879–1880) denove aperis en *Russkij Vestnik* de Katkov, same kiel liaj ĉefaj romanoj *Krimo kaj puno*, *Idioto* kaj *Demonoj*.

Lia romano *La fratoj Karamazov*, ne estis finverkita, sed oni taksas ĝin la plej grava el ĉiuj romanoj de Dostojevskij, en kiu, laŭ la vortoj de Demetrio Karamazov “la diablo kaj Dio interbatalas, kaj la batalkampo estas en la homaj koroj”.

La 8an de junio 1880 Dostojevskij faris paroladon ĉe la malfermo de la monumento Puŝkin en Moskvo, en kiu li prezentis sian esencan opinion pri la rusa nacia karaktero, misio de Ruslando kaj ruslanda inteligencio. La parolado provokis vastan socian kaj literaturan polemikon.

En januaro 1881 Fjodor Dostojevskij pretigis la unuan numeron de *La taglibro de verkisto* por 1881. Sed li ne vidis ĝin presita — la 28an de januaro 1881 lia vivo ĉesis. Senprecedence multaj dekmiloj da homoj akompanis la funebran procesion.

Post la enmondiĝo de sia unua romano, *Malriĉaj homoj*, Dostojevskij skribis al sia frato Miĥail la 1an de februaro 1846:

Nia publiko havas instinkton, sed ne klarecon. Ili ne komprenas, ke oni povas skribi tiastile. Ili al kutimiĝis en ĉio vidi la muzelon de la verkinto, sed mi ne montris mian muzelon. Tamen ili ne komprenas, ke parolas Devuŝkin, sed ne mi, kaj ke Devuŝkin ne povas paroli alimaniere. Oni trovas la romanon tro longa, sed ĝi ne havas eĉ unu superfluan vorton.

Efektive, pluraj legantoj kaj kritikistoj plendis pri la “nekontentiga lingvaĵo” de Dostojevskij: monotona, plumpa, nepolurita, vortabunda, taŭtologia, eklektika, misgvida kaj ... plibonigenda. Kaj pli ol unu tradukanto, frontinta verkojn de

Fjodor Dostojevskij, fariĝis viktimo de pliboniga strebo — la spirito malaperis. Same estas pri la parodioj, facile verkeblaj. Jes, oni povas facile kopii iujn supraĵajn trajtojn de la stilo de Dostojevskij: oftaj ripetoj de la samaj vortoj, miksaĵo de parolstiloj, sed ve — ĉiam sen konsidero de la arta funkcio de tiuj specifajoj.

Ja la beletra mondo de Dostojevskij estas unika, kaj por respeguli ĉi tiun mondon necesis iom unika lingvaĵo — same kiel la mondo de Karolo Piĉ ne estas priskribebla per la lingvaĵoj de Vladimir Varankin aŭ István Nemere. La profunda penetro en la internan mondon de ĉiu aparta homo — hezitema, maltrankvila kaj meditanta — ne ebligas kristalan klarecon kaj tujan kompreneblecon.

En la tekstoj de Dostojevskij kunekzistas kaj kreas apartan estetikan harmonion kancelariaĵoj, gazetaj kliŝoj, evangeliismoj, sciencaj terminoj, literaturaj fremdlingvaj elementoj, strataj esprimoj, eraroj (ofte intencaj) kaj internaj kontraŭdiroj.

Se temas pri la t.n. *eraroj*, sufiĉas rememori la krestomatian ekzemplon en la unua paĝo de *Krimo kaj puno*: “Senespere ŝuldante al la mastrino li timis renkonti ŝin” kiun post kelkaj linioj sekvas “...neniun mastrinon li timis”. Aŭ la karakterizon de Stefano Trofimoviĉ Verĥovenskiĵ — la homo de la scienco, kiu en la scienco faris nenion. Jen lia priskribo:

<...> dum iom da tempo apartenis al la fama plejado de certaj eminentuloj de nia pasinta generacio, kaj dum kelka tempo — eble nur dum unu kurta minuto — lian nomon multaj el tiutempaj hastemuloj prononcis preskaŭ en la sama vico kun la nomoj de Ĉaadajev, Belinskiĵ, Granovskiĵ kaj kun tiu de Herzen, ekaginta tiam eksterlande. Sed la agado de Stefano Trofimoviĉ finiĝis preskaŭ en tiu minuto, kiam ĝi komenciĝis, por tiel diri, pro “turbulo de l’ malfavoraj cirkonstancoj”. Kio do? Poste evidentiĝis, ke neniu turbulo kaj eĉ nenij cirkonstancoj ekzistis, almenaŭ en ĉi tiu okazo <...>

<... > Sed cetere li estis homo tre inteligenta kaj talenta, por tiel diri: la homo de l’ scienco, kvankam, en la scienco li cetere... nu, ni konfesu, ke en la scienco li faris ne tre multon,

verŝajne, tute nenion! Sed tio ja en Ruslando estas ofta inter la homoj de l' scienco.

Li revenis el eksterlando kaj fine de la jaroj kvardekaj li ekmontris brilon de docento ĉe la universitata katedro. Li sukcesis fari nur kelkajn lekcionjn, ŝajne pri araboj; li krome sukcesis defendi brilan disertacion pri la naskiĝonta civila kaj Hansa signifo de la germana urbeto Hanau, kaj ankaŭ pri la apartaj kaj svagaj faktoroj, pro kiuj tiu signifo tute ne efektiviĝis. La disertacio trafe kaj akre mordis tiutempajn slavofilojn, kaj inter tiuj li ricevis multajn kaj furiozajn malamikojn. Poste — cetere, jam post la perdo de la katedro — li sukcesis aperiĝi (verŝajne por venĝi sin kaj por montri, kiun ili perdis) en ĉiumonata progresema revuo, kiu estis tradukanta Dickens kaj propaganta Georges Sand, komencon de tre profunda studo — ŝajne pri kaŭzoj de enorme altmorala nobleco de iuj kavaliroj en iu epoko, aŭ pri io simila. Sendube li akcentis iun altan kaj eksterordinare noblan ideon. Poste venis onidiro pri tio, ke aperiĝo de la daŭrigo de la studo estis rapide malpermesita, kaj ke la progresema revuo eĉ suferis pro la publikigo de la unua parto. Tio ŝajnas tute ebla, ĉar tiam multo povis okazi. Sed en tiu kazo probable okazis nenio speciala, kaj la aŭtoro mem pigris daŭrigi la studon.

Permesu iom halti ĉi tie. Atentu, ke temas ne nur pri sarkasmo, temas pri alia interesa trajto. Ja Stefano Trofimoviĉ Verĥovenskiĵ havas en *Demonoj* prototipon — ruslandan historiiston Timofej Nikolajeviĉ Granovskij.

Nu, ja estas tute evidente, ke lia filo, Petro Verĥovenskiĵ, personigas la teroriston Sergej Neĉajev, kaj ke Karmazinov estas karikaturo de Ivan Turgenev. Sed Stefano Verĥovenskiĵ kaj Granovskij havas alidimensian similecon. Dostojevskij transplantis la molkoran kaj kompromiseman idealiston de la jaroj 1840aj al la tumultaj jaroj 1860aj (Granovskij mortis en 1855) kaj ricevis brilan tipon.

Alvorte, tiu metodo estis pruntita de Gogol, la t.n. “demonarido” — rido pro nura aludo al ideala persono, kiun oni devintus esti. Ni rememoru jenan fragmenton el *La Neva Avenuo* de Gogol:

Antaŭ li sidis Ŝillero, ne tiu Ŝillero kiu verkis “Vilhelmon Telon” kaj “Historion de la tridekjara milito”, sed la konata Ŝillero, ladmajstro el la strato Meŝĉanskaja. Apud Ŝillero staris Hoffmann, ne la verkisto Hoffmann, sed sufiĉe bona botisto el la Oficira strato — intima amiko de Ŝillero. Ŝillero estis ebria. Li sidis sur seĝo, stamfante kaj arde rakontante ion. Tio ja ne mirigus Pirogovon, sed lin tre mirigis la kuriozega dispozicio de la homoj. Ŝillero sidis, elstariginte sian dikan nazon kaj levinte la kapon, kaj Hoffmann tenis per du fingroj lian nazon kaj svingis sian botistan tranĉilon tre proksime al la surfaco de la nazo.

Ŝillero parolis: “Mi ne volas, mi ne bezonas la nazon! Mia nazo bezonas tri funtojn da tabako monate. Kaj mi do pagas en la aĉa rusa vendejo po 40 kopekoj kontraŭ ĉiu funto; tio faras 1 rublon 20 kopekojn, kaj tio faras jare 14 rublojn 40 kopekojn. Ĉu vi aŭdas, mia amiko Hoffmann? 14 rubloj kaj 40 kopekoj nur por la nazo. Kaj dum la festaj tagoj mi snufas francan rapeon, ĉar dum la festoj mi ne volas snufi la aĉan rusan tabakon. Dum la jaro mi ensnufas du funtojn da rapeo, je 2 rubloj kontraŭ funto. Ses kaj dek kvar estas 20 rubloj 40 kopekoj nur por tabako. Rabado! Ĉu ne tiel, mi demandas vin, mia amiko Hoffmann? Sed mi estas ŝvaba germano; mi havas reĝon en Germanio. Mi ne volas havi la nazon. Tranĉu mian nazon! Jen mia nazo!

Demona rido, kvazaŭ petolado de Mefisto (Mefistofelo en la traduko de Bartelmes) diboĉanta kun studentoj en la kelo de Aŭerbaĥ. Kvazaŭ Mefisto mem blage verkus ĉi tion, same kiel la Kanton pri la Pulo, sed inversiginte la rolojn.

Same kiel Ŝillero kaj Hoffmann ĉe Gogol rolas ankaŭ Karmazinov kaj Stefano Trofimoviĉ ĉe Dostojevskij. Kaj Gogol kaj Dostojevskij ne toleris la moralajn kaj estetikajn ikonojn, kiaj estis Ŝillero kaj Hoffmann por Germanio kaj Turgenev kaj Granovskij por Ruslando.

La plej majestan ideon Gogol enkorpigis en botisto, kaj Dostojevskij la noblegan kaj modelan klerulon Granovskij metis en la komikan staton de parazita loĝado ĉe riĉa vidvino. Same absurde kiel en la historio pri la tro kara Ŝillera nazo de Gogol.

Revenante al la ŝajne kontraŭdira karakterizo de “la homo de l’ scienco”, oni povas nur ripeti la konstaton de Miĥail Baĥtin, laŭ kiu la arta mondo de Dostojevskij estas kreita per la metodo de “senca polifonio” — diversaj vidpunktoj estas prezentataj samtempe kaj egalrajte. La aŭtoro jen lasas la protagonistojn prezenti siajn vidpunktojn, jen ili diskutas, jen li mem intervenas kaj ... li ne ĉiam venkas en la dialogo.

Tio montriĝas ne nur en la intrigo, sed ankaŭ en la lingvaĵo. La monologo iĝas kvazaŭdialogo, kaj la sama vorto povas ricevi kromsignifojn, ekzemple, la vorto *ŝajni* en la monologo (aŭ dialogo kun imagata leganto) de la protagonisto de la *Noticoj el la kelo*:

Ĉu al vi, sinjoroj, *ŝajnas*, ke mi nun pro io pentas antaŭ vi, aŭ petas vian pardonon pro io?.. Mi estas konvinkita, ke tio *ŝajnas* al vi... Cetere, mi diras sincere, ke mi fajfas pri viaj *ŝajnoj* ... (mia kursivigo. — A.K.)

Post ĉiu el la tri supraj frazoj la paradoksisto haltas, kvazaŭ esplorante la vizaĝesprimon de la alparolato. Estiĝas kontakto kun la vera leganto. La dialogeco kaj senca plurtavoleco buntigas la enhavon kaj la lingvaĵon mem. La lingvaĵo de Dostojevskij estas malfermita kaj libera same kiel la mondo, kiun li kreas. Dostojevskij bone konsciis la reagon de kritikistoj, sed li ne evitis longajn frazojn kaj ripetojn, se tiuj necesis por la emocia ritmo de la rakontado kaj por plena sinesprimo de la protagonistoj. Tamen li uzis ankaŭ, en la samaj paĝoj, nekutime mallongajn frazojn.

Laŭ Valerjan Pereverzev:

La parolado de Dostojevskij kvazaŭ rapidas kaj anhelas. Vortoj jen senorde amasiĝas, kvazaŭ la penso rapide serĉus sian formon kaj ne povus trovi ĝin; jen vortoj finiĝas abrupte, bruske, falas kiel tranĉitaj frazoj; iam estas nura vorto tie, kie gramatike oni bezonas tutan frazon.

Tute vere. Ni vidu la komencon de *La noticoj en la kelo*:

Mi estas malsana homo... Mi estas malica homo. Nealloga homo mi estas. Mi pensas, ke la hepato doloras min. Cetere,

mi tute nenion komprenas pri mia malsano kaj ne scias certe, kio min doloras. Mi ne konsultas doktorojn kaj neniam estis kuracata, kvankam mi respektas la medicinon kaj la doktorojn. Krome, mi estas ege superstiĉa; almenaŭ en sufiĉa grado por respekti la medicinon. (Mi estas sufiĉe klera por ne esti superstiĉa, sed mi estas superstiĉa.) Ne, mi deziras ne esti kuracata pro la malico. Vi tion, verŝajne, ne degnas kompreni. Jes, sinjoroj, sed mi komprenas. Mi evidente ne sukcesos al vi klarigi, kiun mi damaĝos ĉi-kaze per mia malico; mi tre bonege scias, ke mi ne povas “koti” al la doktoroj per tio, ke mi ne konsultas ilin; mi scias pli bone ol ĉiuj, ke per tio mi malutilos nur al mi mem, al neniu alia. Tamen mi ne konsultas doktorojn ĝuste pro la malico. La hepato doloras min, do ĝi doloru pli forte!

kaj la longegan frazon post kelkaj paĝoj:

Ho, plej absurda absurdaĵo! Tute alia afero estas kompreni ĉion, konscii ĉion, ĉiujn neeblaĵojn kaj ĉiujn ŝtonajn murojn; konsenti kun neniu el tiuj neeblaĵoj kaj ŝtonaj muroj, se vi abomenas konsentojn; veni per plej neeviteblaj logikaj kombinoj al plej hidaj konkludoj pri la eterna temo, ke eĉ pro la ŝtona muro vi estas parte kvazaŭ kulpa, kvankam ja estas tute evidente, ke vi tute ne kulpas, kaj pro tio, silente kaj senforte grincante per la dentoj, volupte stuporiĝi en la inercio, reve pensante, ke vi eĉ ne havas iun pro kiu vi estu malica, ke la objekto ne estas trovita kaj eble neniam estos trovita, ke ĉi tie estas anstataŭigo, falsado, kartluda truko, ke ĉi tie estas simple miksaĵo — nekonate kio kaj kiu, sed malgraŭ la nekonateco kaj falsado, vi tamen sentas doloron, kaj ju pli multe vi ne konas, des pli granda estas la doloro!

inter kiuj la protagonisto sarkasme dialogas kun si mem

Cetere, pri kio la deca homo povas paroli kun plej granda plezuro?

Respondo: pri si mem.

Do mi parolu pri mi mem.

(Alvorte, ĉi tie Dostojevskij parodias la vortojn de Nikolaj Ĉerņyševskij el ties *Antropologia principo en filozofio*: “La homo plej unue amas sin mem”).

La protagonisto gale mokas kaj sarkasmas:

Mi petas vin, sinjoroj, foje aŭskulti atente ĝemojn de dekaŭjarcenta klerulo, suferanta pro la dentodoloro, je la dua aŭ tria tago de la dolorado, kiam li jam komencis ĝemi ne tiel, kiel li ĝemis unuatage, do ne nur pro tio ke la dentoj lin doloras, ne kiel kruda kampulo, sed kiel homo tuŝita de la evoluo kaj eŭropa civilizacio kaj kiel homo “rezigninta la grundon kaj la popolan devenon”, laŭ la nuntempa esprimo. Liaj ĝemoj iĝas iel fiaj, noce malicaj kaj daŭras dum tutaj tagoj kaj noktoj.

sed la atenta leganto povas rimarki, ke ĝuste lia dialoga monologo iom post iom iĝas same fia, moke malica kaj tiel daŭras ĝis la fino de la unua — teoria — parto de la *Kelo*.

Dostojevskij en la *Kelo* unuafoje montris la stilon, kiu poste plene reveliĝis en liaj Grandaj Romanoj. Jam en la *Kelo* la rakonto atingas la nivelon de l' konfeso. La konfeso aspektas absolute sincera, eĉ ekshibicia. Sed samtempe oni sentas, ke la konfesanto jen orgojlas pro tiu malkaŝeco, jen timas ĝin kaj ŝirmas la esencon post la detaloj. Ĝuste la protagonisto — nur li, ne Dostojevskij, kiu nur en la kelkfraza enkonduko koncize karakterizas lin. Dostojevskij klare ne simpatias kun li, tamen li ne timas atribui al la hida malheroo kelkajn el siaj ideoj. Kaj Dostojevskij ne montris al la kelulo vojon al savo. La nobla korimpeto de la komencanta ĉiesulino Lisa ne efikis al li salubre, sed nur restigis plian cikatron en lia incitita menso kaj plian vundon en lia laca koro; kaj lia reago draste humiligis kaj teruris la kompatindan junulinon.

Tiu stilo estas unika en la rusa literaturo. Ĝin malhavis la pli fruaj verkistoj — Puŝkin, Lermontov kaj Gogol — kaj liaj samtempuloj: Turgenev kaj Tolstoj. Kaj ĝi restis unika.

Dostojevskij la 11an de decembro 1868 skribis al Apollon Majkov:

Mi havas tute alian opinion pri la realeco kaj realismo ol niaj realistoj kaj kritikistoj. Mia idealismo estas pli reala ol la ilia... Per ilia realismo oni ne povas klarigi eĉ centonon de la reale

okazintaj faktoj. Sed ni per nia idealismo eĉ profetis faktojn.
Tiel okazis.

Ĉi tiujn stilajn specifaĵojn devas konsideri la tradukantoj de la verkoj de Dostojevskij en la internacian lingvon. Niaj tradukoj ne povas aspekti senriproĉaj pro ŝajna abundo de malglataĵoj kaj nekonsekvenca uzado de la lingva materialo — la celo de la traduko ne estas malplumpigi, glatigi aŭ senbalastigi la originalon.

Pro la menciitaj stilaj specifaĵoj iujn el nepreparitaj legantoj eble povas tedi kelkaj (tro) ofte uzataj vortoj tipe de Dostojevskij: *aflikti, angoro, emociiĝi, freneza, kvazaŭ, maltrankvila, terurak*. a. Pro tio la protagonistoj ofte *krias, paliĝas, ruĝiĝas kaj konfuziĝas*. Pro tio aperas ŝajne senbazaj kaj nelertaj fremdlingvaĵoj (ekzemple, *abordi, avenanta, drappedama, monteri, pointoj* k.s.) Sed ĉio ĉi apartenas al la mondo de Dostojevskij, samkiel lia priskribo de Peterburgo kun ties pejzaĝo, por kiu li ne ŝparas grizajn kolorojn. Antaŭ la legantoj aperas densaj kaj malaltaj ĉambroj-keloj, sufokaj kaj polvozaj stratoj, haladzaj drinkejoj... Sed ja temas pri la plej bela Ruslanda urbo, kaj jen en la duondelira menso de Raskoljnikov foj-foje aperas ĝia majesta panoramo, kaj jen la Revanto en la *Blankaj noktoj* surprizas la legantojn per la historio de la preskaŭ viva helroza dometo.

Nur kelkfoje la tradukantoj estis devigitaj kompromisi kun la principo de la legebleco kaj dividis tro longajn plurpropoziciajn frazojn por ne konfuzi la legantojn.

Kelkaj specialaj realaĵoj, terminoj, nomoj kaj aludoj aperas en la apendicaj notoj, sed estas utile doni skizan prezenton de la nomoj kaj rangoj de Ruslando, kiuj kelkfoje gravas por pli bona kompreno.

La rusaj nomoj konsistas el tri partoj: antaŭnomo (baptnomo), patronomo (derivaĵo de la antaŭnomo de la patro) kaj familinomo. Alparolo per la nura antaŭnomo estas familiara, per la antaŭnomo kaj patronomo — ĝentila.

Sekvante la modelon de Antoni Grabowski (*La neĝa blovado*), Kabe (*Patroj kaj filoj*), Vladimir Varankin (*Metropoliteno*), Sergio Pokrovskij (*La majstro kaj Margarita*), Vladimir Vyĉegĵanin (*Malvivaj animoj*) k.a. estis asimilitaj la internacie konataj kristanaj antaŭnomoj (Andreo, Antono, Barbara, Ivano, Jakobo, Petro, Stefano), sed la patronomoj estis transskribitaj.

La familinomoj estis asimilitaj nur se ili havas Esperantan formon en PIV (Napoleono, Ŝekspiro, Ŝillero k.a.). La ceteraj homaj nomoj restis neasimilitaj.

Krom la nomoj, gravaj estas eĉ la formoj de l' alparolado, precipe en la epistola romano *Malriĉaj homoj*. Ekzemple, la dialektaĵo “маточка” el la historie grava regiono de Rjazanĵ estas unu el la pluraj rusaj karesformoj de “patrino”, kaj estas tute normale se mezaĝa viro tiel alparolas junulinon. (Makar Devuŝkin uzas ĉi tiun vorton en la romano 242 fojojn!) Sed ĉar en la Esperanta literaturo tia formo estas nekonata, la tradukantoj elektis pli kutiman formon, *karulinjo*.

Estas kurioze, ke la du anglaj tradukintoj, kies tradukojn mi konsultis ĉe la redaktado uzis diversajn formojn. **C.J. Hogart**: “darling”, “my dearest” (tute same li tradukas eĉ la tro oficialan “милостивая государыня”), “my beloved”; **Olga Shartse**: “my dear”, “dearest”, “my sweet dear”, “dear heart”. Sed **Marc Shapiro** en la franca traduko ĉiam tenis sin ĉe “ma petite mère”.

Plurfoje en la verkoj estas menciataj rangoj de ŝtataj oficistoj, kiuj determinas la socian pozicion de la koncerna persono. La ruslanda rangtabelo estis establita de Petro la Granda en 1722. Ĝi enhavis 14 rangojn civilajn, armeajn, maristajn, ekleziajn kaj kortegajn. La tabelo estis kelkfoje reviziita, sed meze de la 19a jarcento la civilaj kaj armeaj rangoj estis jenaj:

1. kanceliero = efektiva sekreta konsilisto unuaranga (feldmarŝalo);
2. efektiva sekreta konsilisto (infanteria generalo);
3. sekreta konsilisto (general-leŭtenanto);
4. efektiva ŝtata konsilisto (general-majoro);
5. ŝtata konsilisto (—);

6. kolegia konsilisto (kolonelo);
7. kortega konsilisto (subkolonelo);
8. kolegia asesoro (majoro);
9. titola konsilisto (kapitano);
10. kolegia sekretario (stabkapitano);
11. ŝipsekretario (—);
12. gubernia sekretario (leŭtenanto);
13. provinca sekretario (subleŭtenanto, kornedo);
14. kolegia registristo (standardisto).

Antaŭ la fina parto de ĉi tiu referaĵo mi proponas fragmenton el la lasta letero de Makar Devuŝkin en *Malriĉaj homoj*:

Aĥ, karulinjo, karulinjo! Kial vi kuraĝis, kial vi kuraĝis je tia ekstrema ago? Kion vi faris, kion vi faris, kion vi faris al vi mem! Ja tie oni vin enĉerkigos; tie oni malsatmortigos vin, anĝelo! Ja vi, karulinjo, estas malforta kiel plumeto! Sed kie mi estis? Kial mi, stultulo, gapadis? Mi ja vidis, ke la infano kapricas, ke la infanon doloras la kapo! Ja mi devis reagi simple — sed ja ne, mi estis stulte stulta, tute ne pensis, vidis nenion, kvazaŭ mi pravus, kaj kvazaŭ la afero ne koncernus min; kaj eĉ kuris por aĉeti la falbalon!.. Ne, Varenjka, mi ellitiĝos; mi ĝis morgaŭ eble resaniĝos, kaj mi nepre ellitiĝos!.. Mi, karulinjo, ĵetiĝos sub la radojn; mi ne lasos vin foriri! Nepre ne, ja kio vere okazas? Laŭ kiu rajto ĝi estas farata? Mi kun vi veturos; mi kuros post la kaleŝo, se vi ne kunprenos min, mi plenforte kurados dum mi povos spiri. Sed ĉu vi almenaŭ scias, kio estas tie, kien vi veturas, karulinjo? Vi eble tion ne scias, do demandu min! Tie estas stepo, mia kara, stepo, nuda stepo; nuda kiel mia polmo. Tie estas nur sensentaj kampulinoj kaj malkleraj kampuloj, drinkuloj. Tie jam la folioj forŝutiĝis de la arboj, tie pluvos, tie malvarmas — sed tien vi veturos!

En 1993 *Sezonoj* eldonis la romanon *Krimo kaj puno*, kiun tradukis Andrej Parfentjev. La libro aperis en la prestiĝa libroserio *Oriento-Okcidento*.

Preskaŭ post unu jardeko, en 2002 *Sezonoj* eldonis *Blankajn noktojn* — kolekton de ses verkoj de Dostojevskij, aperintaj antaŭ la Grandaj Romanoj. Kvar el ili, kiujn oni kutime nomas “fruj”, estis eldonitaj antaŭ la aresto de la verkisto. Cetere, la vorto “frua” estas apenaŭ aplikebla al Dostojevskij. Li malhavis la kutiman “debutan periodon” kaj venis en la rusan literaturon kiel tute matura aŭtoro. (Krome, ĉiun el tiuj verkoj li reviziis kaj parte reverkis en la jaroj 1860aj).

Malriĉaj homoj (Бедные люди) diskoniĝis jam antaŭ la apero. Ricevinte la manuskripton, Dmitrij Grigoroviĉ, kiu lernis kun Dostojevskij en la Inĝeniera Superlernejo, portis ĝin al Nekrasov kaj rekomendis aperigi ĝin en la dua almanako de la naturalisma skolo, al kies unua almanako *Fiziologio de Peterburgo* li kontribuis per *Peterburgaj gurdistoj*.

Nokte ili duope tralegis ĝin kaj je la kvara horo matene venis al Dostojevskij por esprimi sian raviĝon. Matene Nekrasov iris al Belinskij, donis al li la manuskripton kaj diris: “Nova Gogol aperis!” La nekredemo de Belinskij baldaŭ malaperis kaj vespere li entuziasme petis, ke Nekrasov tuj konatigu al li la aŭtoron.

En la unua renkontiĝo Belinskij flame diris al Dostojevskij:

La vero estas malfermita kaj anoncita al vi kiel al artisto, ĝin vi ricevis kiel donacon; alte taksu ĉi donacon, restu fidela kaj vi iĝos granda verkisto!

Valerian Majkov skribis, ke

ankoraŭ en novembro kaj decembro 1845 ĉiuj literaturaj diletantoj estis kaptantaj kaj pluĵetantaj la ĝojigan novaĵon pri apero de nova grandioza talento.

La akcepton de sia unua romano Dostojevskij arte priskribis en *Humiligitaj kaj ofenditaj* (parto 1, ĉap. V-VI). Post tiaj reagoj la romano estis kondamnita al sukceso kaj al kondamno fare de la konservativa kritiko — ĉi tiel ja okazis.

Sozio (Двойник) aperis kelkajn tagojn post *Malriĉaj homoj* kaj estis akceptita malpli varme ol la unua romano, kvankam Belinskij menciis, ke

en *Sozio* estas ankoraŭ pli multe da krea talento kaj pensprofundeco ol en *Malriĉaj homoj*.

Nuntempe oni konas *Sozion* per la dua eldono, kiun la aŭtoro grave reviziis en 1866 (ĝia traduko aperis en nia volumo). Laŭ Vladimir Nabokov, *Sozio* estas la plej bona verko de Dostojevskij, “kvankam ĝi estas aroga imito de *Nazo* de Gogol”.

Blankaj noktoj (Белые ночи) evoluigas la figuron de la revanto, kies trajtoj estis skizitaj en *Malriĉaj homoj*, *Mastrino* kaj *Malforta koro* (poste en *Netoĉka Nezvanova* kaj en *Humiligitaj kaj ofenditaj*).

Honesta ŝtelisto (Честный вор) estas enlibrigita por iomete prezenti la kontribuon de Dostojevskij al la rakonta ĝenro.

La du lastaj noveloj de ĉi tiu volumo estis verkita post la reveno de Dostojevskij el ekzilo al Peterburgo.

Misfortuna historio (Скверный анекдот) montras kolizion de la humanismaj ideoj kun la “ofica pozicio” fone de la liberalaj reformoj en Ruslando komence de la 1860aj jaroj.

Noticoj el la kelo (Записки из подполья) markas la komencon de la nova etapo, kiu definitive formiĝos en *Krimo kaj puno*, kaj kiu estas ofte nomata “fantasta realismo”. Per la *Kelo* Dostojevskij dubigis ne nur la manieron atingi la “helan estontecon”, sed ankaŭ la celon de la socialismaj movadoj, ĉar li antaŭkurante sian tempon klare konsciis, ke “realigita socialismo” malebligos elekton kaj ne povos lasi la homon spirite libera. Aliflanke, li montras la mizerecon de la filozofio de sia “malheroo” (seniluziiginta adepto de la demokratia romantismo de la antaŭa generacio), baziĝanta sur ignorado de la realeco kaj sur dominado de la estetiko super la etiko kaj moralo.

La tradukan laboron efektivigis moskvano Grigorij Arosev, siberiano Aleksej Birjulin kaj mi, Aleksander Korĵenkov, kiu ankaŭ redaktis la tuton.

Sed la rezulto de la tradukado evidente estus malpli bona, se ni ne sekvus la konatan regulon: oni nepre donu la tradukon al persono, kies gepatra lingvo prefere ne estas la lingvo de la fontoteksto.

Tial mi ŝatus fine esprimi koran dankon al niaj “legistoj”: Danlanda germano Wolfgang Kirschstein, svedo Sten Johansson, franco Daniel Luez, kaj ruslandano Alen Kris.

Oni povas nur bedaŭri, ke pro la tre malrapida debito de la kolekto *Blankaj noktoj*, la eldonejo *Sezonoj* devis ĉesigi la kvinvoluman projekton “Dostojevskij en Esperanto”. Ni esperas ke la du volumoj, eldonitaj en 1993 kaj 2002, digne prezentas la verkaron de Fjodor Dostojevskij al la esperantista legantaro.

Fjodor Dostojevskij

LA KAMPULO MAREJ

Sed mi pensas, ke ĉi tiujn professions de foi[1] estas tre enue legi, kaj tial mi rakontu anekdoton, eĉ ne anekdoton, sed nur tre malnovan rememoron, kiun mi ial volas rakonti ĝuste ĉi tie kaj nun, fine de nia traktaĵo pri la popolo. Tiam mi havis nur naŭ jarojn... sed ne, mi prefere komencu de la tempo, kiam mi havis dudek naŭ jarojn[2].

Estis la dua tago de la Paska Semajno. La aero estis varma, la ĉielo estis blua, la suno estis alta, “varma”, hela, sed mia animo estis tre malgaja. Mi vagis sencele post la barakoj, mi rigardis kaj kalkulis la palisojn en la fortika prizono palisaro, sed mi eĉ ne volis kalkuli ilin, kvankam tio estis kutima por mi. Jam la duan tagon en la prizono “estis festo”; oni ne kondukis la bagnulojn al laboroj, ebriuloj estis multegaj, en ĉiuj anguloj ĉiuminute komenciĝis insultoj kaj kvereloj. Sonis abomenaj, fiaj kanzonoj; oni ludis kartojn sub tabullitoj; sur tabullitoj jam kuŝis kelkaj bagnuloj, duonmorte draŝitaj de siaj kamaradoj pro troa batalemo, kovritaj per ŝafpeltaj paltoj, ĝis reviviĝo kaj rekonsciĝo; jam kelkfoje tranĉiloj estis prenitaj — ĉio ĉi, dum la du festaj tagoj, elturmentis kaj malsanigis min. Mi neniam povis sen abomeno elporti la ebrian popolan diboĉadon, precipe en ĉi tiu loko. En ĉi tiuj tagoj eĉ estroj ne venis en la prizanon, ne faris priserĉadon, ne serĉis drinkaĵon, komprenante, ke unu fojon en la jaro oni devas permesi festadon eĉ al tiuj elĵetuloj, kaj ke sen tio estus eĉ pli malbone. Finfine en mia koro ekflamis malico. Mi hazarde renkontiĝis kun la polo M-cki[3], politika arestito; li ĵetis al mi malgajan rigardon, liaj okuloj fulmis, kaj liaj lipoj ektemis:

“Je haïs ces brigands![4]” — li mallaŭte diris, grincante la dentojn, kaj preteriris min. Mi revenis en mian barakon, kvankam antaŭ kvarona horo mi forkuris el ĝi, kiel frenezulo, kiam ses fortaj viroj samtempe ĵetis sin sur ebrian tataron Gazin por bridi lin kaj komencis lin bati; ili batis lin absurde senkompate, eĉ kamelon oni povus mortigi per tia batado; sed ili sciis, ke ĉi tiun Heraklon oni ne povas facile mortigi, do ili batis lin sen timi pri lia vivo. Reveninte, mi rimarkis ke fine de la barako, sur angula tabullito, sub ŝafpelta palto, senkonscie kuŝas Gazin, preskaŭ ne montrante vivsignojn; ĉiuj senvorte preteriris lin. Kvankam ĉiuj firme esperis, ke li rekonsciiĝos morgaŭ matene, “sed ja pro tia draŝado ĉio povos okazi, kaj eble la homo mortos”. Mi venis al mia loko, apud fenestro kun metala krado, kaj kuŝiĝis sur la dorson, metinte la manojn sub la kapon kaj ferminte la okulojn. Mi ŝatis tiel kuŝadi: ja oni ne kroĉiĝas al la dormanto, kaj en tia stato eblas revii kaj pensi. Sed mi ne povis revii; mia koro batis maltrankvile, kaj en miaj oreloj resonis la vortoj de M-cki: “Je haïs ces brigands!” Cetere, kial mi priskribu tiamajn impresojn; ankaŭ nun mi foje songas tiun tempon, kaj mi ne havas pli turmentajn songojn. Eble oni rimarkis, ke ĝis hodiaŭ mi preskaŭ neniam parolis publike pri mia vivo dum la bagnado; antaŭ dek kvin jaroj mi verkis “Noticojn el la domo de morto”, uzante elpensitan rakontanton[5], krimulon, juĝitan pro murdo de sia edzino. Mi povas aldoni, ke de tiam tre multaj pensas kaj eĉ nun firme kredas, ke mi estis sendita al bagnado pro murdo de mia edzino[6].

Iom post iom mi efektive forgesis ĉion realan kaj nerimarkeble sinkis en rememorojn. Dum mia kvarjara bagnado mi senĉese rememoris mian tutan pasintecon kaj, ŝajne, denove revivis mian vivon en rememoroj. Tiuj rememoroj aperis mem, malofte mi elvokis ilin propravole. Ili kutime komenciĝis de iu punkto, streketo, foje nerimarkebla, kaj poste iom post iom ili kreskis ĝis kompleta bildo, ĝis forta kaj kompleta impresio. Mi analizis tiujn impresojn, mi donis novajn detalojn al ĉio delonge pasinta kaj, ĉefe, mi senĉese korektis la pasintecon, kaj tio estis mia

sola tiutempa amuziĝo. Tiufoje en mia memoro ial subite aperis ordinara momento el mia frua infanaĝo, kiam mi havis nur naŭ jarojn — tiun momenton, ŝajne, mi tute forgesis; sed tiam mi precipe ŝatis rememorojn de mia frua infanaĝo. En mia memoro aperis aŭgusto en nia vilaĝo. Tiu tago estis seka kaj suna, sed iom malvarma kaj venta; la somero proksimiĝis al la fino, kaj necesis baldaŭ veturi al Moskvo por denove enui tie la tutan vintron dum francaj lecionoj, kaj mi tre bedaŭris pro la forveturo el la vilaĝo. Mi iris post la draŝejon, iris malsupren al ravino kaj, supreniris al Losk — tiel ni nomis densan arbustaron inter la ravino kaj posta bosko. Mi venis al la plej densaj arbustoj kaj aŭdis, ke proksime, post tridek paŝoj, sur kampeto, plugas sola kampulo. Mi sciis, ke li iras supren kaj lia ĉevalo peze tiras la plugilon, kaj al mi kelkfoje venis lia instiga krio: “Hoto! Hot!” Mi konis preskaŭ ĉiujn niajn servutulojn, sed mi ne sciis, kiu el ili nun plugas; kaj tio ne interesis min, mi estis plene absorbita de mia afero. Ankaŭ mi laboris: mi estis derompanta juglandan vergon por bati ranojn. Juglandaj vergoj estas tre belaj, sed tre rompiĝemaj, multe malpli fortikaj ol la betulaj. Interesas min ankaŭ diversaj muŝetoj kaj skaraboj, mi kolektas ilin, kelkaj el ili estas tre belaj. Mi ŝatas ankaŭ malgrandajn, rapidajn ruĝa-flavajn lacertojn kun nigraj punktoj, sed serpentojn mi timas. Tamen serpentoj estas multe malpli oftaj ol lacertoj. Ĉi tie ne estas multaj fungoj; por pluki fungojn necesas iri al la betularo, kaj mi estas irona tien. En mia vivo mi nenion ŝatis pli ol la arbaron kun fungoj kaj beroj, kun insektoj kaj birdetoj, erinacoj kaj sciuroj, kun mia ŝatata malseka odoro de putrintaj folioj. Eĉ nun, skribante ĉi tion, mi sentas la odoron de nia vilaĝa betularo: ĉi tiuj impresoj restas por la tuta vivo. Subite, tra profunda silento, mi tre klare aŭdis krimon: “Lupo kuras!” Mi ekkriis kaj, terure timigite, plenvoĉe kriegante, elkuris sur la kampeton, rekte al la pluganta kampulo.

Li estis nia servutulo Marej. Mi ne scias, ĉu tiu nomo estas reala, sed ĉiuj nomis lin Marej[7]. Li estis proksimume kvindekjara, forta, sufiĉe alta, kun multe da grizo en la granda bruna barbo. Mi konis lin, sed ĝis nun mi preskaŭ neniam interparolis kun li.

Li eĉ haltigis sian etan ĉevalinon, aŭdinte mian krion, kaj kiam mi alkurinte kaptis per unu mano lian plugilon, kaj per la alia — lian manikon, li rimarkis mian timon.

— Lupo kuras! — mi kriis, anhelante. Li skue levis la kapon kaj nevole ĉirkaŭrigardis, dum unu momento preskaŭ kredante min.

— Kie estas la lupo?

— Iu kriis... Iu ĵus kriis: “Lupo kuras”... — mi balbutis.

— Ne diru, ne diru, neniu lupo, vi misaŭdis; vidu! Neniu lupo ĉi tie povas esti! — li balbutis, kuraĝigante min. Sed mi tutkorpe tremis kaj pli forte kroĉis lian senkoluman kaftanon kaj, verŝajne, mi estis tre pala. Li rigardis al mi kun malkvieta rideto, evidente timante kaj alarmite pro mi.

— Aj, aj! Vidu, kiel vi ektimis! — li balancis sian kapon. — Sufiĉe, karulo. Aj, etulo!

Li etendis sian brakon kaj subite mankaresis mian vangon.

— Sufiĉe jam, Kristo estas kun vi, krucosignu vin. — Sed mi ne krucosignis min; la anguloj de miaj lipoj tremetis, kaj tio, ŝajne, precipe mirigis lin. Li delikate tuŝis miajn tremetantajn lipojn per sia dika, termakulita, nigraunga fingro.

— Aj, vidu ja, — li mienis al mi per iom patrineca kaj longa rideto, — Dio, kio ja okazas, vidu, aj, aj!

Mi finfine komprenis, ke ĉi tie estas neniu lupo kaj ke mi misaŭdis la krion: “Lupo kuras”. Kvankam la krio estis tre klara, sed tiaj krioj (ne nur pri lupoj) jam unu aŭ du fojojn halucinis min, kaj mi sciis tion. (Post la paso de mia infanaĝo, ĉesis ankaŭ tiaj halucinoj.)

— Do, mi iros, — mi diris, demande kaj timide rigardante al li.

— Do, iru, kaj mi rigardos al vi. Ja mi ne donos vin al lupo! — li aldonis, plu patrinece ridetante al mi, — Kristo estas kun vi, iru do, — li krucosignis min per sia mano kaj poste krucosignis sin. Mi ekiris, retrorigardante je ĉiu deka paŝo. Dum mi iris, Marej plu staris kun sia ĉevalineto kaj rigardis al mi, balancante sian kapon, kiam mi retrorigardis. Mi konfesas, ke mi iom hontis antaŭ li pro mia timo, sed mi iris, ankoraŭ tre timante la lupon, ĝis kiam

mi supreniris al la rando de la ravino, kie estis la plej proksima garbejo; tie la timo tuj forsaltis de mi, kaj de ie subite sin ĵetis al mi nia korthundo Volĉok. Kun Volĉok mi tute rekuraĝiĝis kaj lastfoje returnis min al Marej, mi ne plu povis klare vidi lian vizaĝon, sed mi sentis, ke li plu same tenere ridetas al mi kaj balancas sian kapon. Mi mansvingis al li, ankaŭ li mansvingis al mi kaj irigis sian ĉevalineton.

— Hoto, hot! — denove aŭdiĝis lia malproksima krio, kaj la ĉevalineto denove ektiris sian plugilon.

Ĉio ĉi subite aperis en mia memoro, tute senkaŭze, sed mirinde precize kaj detale. Mi subite rekonsciiĝis kaj sidiĝis sur mia ligna lito kaj, mi memoras, ke sur mia vizaĝo ankoraŭ estis dolĉa rideto de la rememoro. Dum unu plia minuto mi plu rememoris.

Reveninte hejmen post la renkontiĝo kun Marej, mi al neniu rakontis mian “aventuron”. Ĉu vere estis aventuro? Ankaŭ lin mi tiam tre baldaŭ forgesis. Renkontiĝante kun li poste, mi neniam eĉ alparolis lin, ne nur pri la lupo, sed pri nenio alia, sed nun, post dudek jaroj, en Siberio, mi subite rememoris tiun tutan renkontiĝon tre klare, ĝis la plej eta detalo. Do, ĝi kuŝis en mia animo nerimarkite, mem, sen mia deziro, kaj ĝi subite reaperis en mia memoro en la plej necesa momento; reaperis la tenera kaj patrineca rideto de la malriĉa servutulo, liaj signoj de kruco, lia kapobalancado, lia “Vidu, kiel vi ektimis, etulo!” kaj precipe lia dika termakulita fingro, per kiu li tuŝis miajn tremetantajn lipojn delikate kaj kun timida tenero. Certe, ĉiu kuraĝigus timigitan infanon, sed tiam, dum nia soleca renkontiĝo, okazis io kvazaŭ tute alia, kaj se mi estus lia propra filo, li ne povus rigardi al mi per rigardo, radianta je pli hela amo. Sed ĉu iu devigis lin? Li estis nia propra servutulo, kaj mi estis por li sinjorido; neniu eksciis, kiel li karesis min kaj neniu rekompencus lin pro tio. Ĉu eble li tre amis malgrandajn infanojn? Tiaj homoj ekzistas. La renkontiĝo estis soleca, en senhoma kampo, kaj eble nur Dio vidis de supre, per kiel profunda kaj hela homa sento kaj per kiel delikata, preskaŭ virina tenero povas esti plenigita la koro

de kruda, beste malklera rusa servuta kampulo, tiam ankoraŭ nek esperanta, nek aspiranta sian liberigon. Diru, ĉu ne pri tio pensis Konstantin Aksakov[8], parolante pri la alta klernivelo de nia popolo?

Mi memoras ke, forlasinte mian lignan liton kaj ĉirkaŭrigardinte, mi subite eksentis, ke mi povas rigardi al tiuj malfeliĉuloj per tute aliaj okuloj, kaj ke subite, pro iu miraklo, el mia koro tute malaperis la tuta malamo kaj malico. Mi ekiris, atente rigardante la renkontatajn vizaĝojn. Jen por eterne ekzilita kampulo kun la razita kapo kaj kun brulstampoj sur la vizaĝo sible kriaĉas sian ebrian kanton — sed eble li estas la sama kiel Marej, mi ja ne povas enrigardi en lian koron. Samvespere mi ankoraŭfoje renkontiĝis kun M-cki. Malfeliĉulo! Ja li certe ne povus rememori iun ajn Marejon, kaj li ne povus rigardi al tiuj homoj alimaniere ol kun la vortoj: “Je haïs ces brigands!”. Ne, la poloj tiam pli suferis ol ni.

Tradukis el la rusa
Aleksander Korĵenkov

NOTOJ

La kampulo Marej (Мужик Марей) unue aperis en *La taglibro de verkisto*. 1876, №2. La Esperanta traduko de A. Korĵenkov aperis en *La Ondo de Esperanto*, 2003, №4.

1. [professions de foi](#). simbolo de la kredo (*fr.*).

2. [naŭ jarojn ... dudek naŭ jarojn](#). Unuafoje Dostojevskij venis al Darovoje printempe 1832, kiam li havis dek jarojn. La priskribita evento en la bagnejo okazis la 9an de aprilo 1851, la duan tagon de Pasko.

3. [M-cki](#). La polan revoluciulon Aleksander Mireckij Dostojevskij priskribis en la 8a ĉapitro *Kamaradoj* de la dua parto de *Noticoj el la domo de morto*.

4. [Je haïs ces brigands!](#) Mi abomenas ĉi tiujn rabistojn! (*fr.*).

5. ... [elpensitan rakontanton](#). *Noticoj el la domo de morto* estis eldonitaj en 1860–62 kiel posteuma kajero de Aleksandr Petroviĉ Gorjanĉikov.

6. ... tre multaj pensas kaj eĉ nun firme kredas, ke mi estis sendita al bagnado pro murdo de mia edzino. Anna Dostojevskaja, la dua edzino de la verkisto, rememoris, ke, kvankam antaŭ ilia konatiĝo ŝi sciis, ke li estis kondamnita pro politika krimo, ŝi plurfoje aŭdis en la junaĝo, ke Dostojevskij murdis sian edzinon. Ŝi asertis, ke ĉi tiu absurda onidiro estis konata ankaŭ en la rusa komunumo en Dreseno, kie la geedzoj Dostojevskij loĝis en 1869–1871.

7. **Marej.** Mark Jefremov, kampulo el Darovoje.

8. **Aksakov, Konstantin Sergejeviĉ** (1817–1860). Rusa poeto, kritikisto, dramaturgo, historiisto, teoriisto de “slavofilismo”. Temas pri lia eseo *Pri la moderna homo*, el la artikolaro *Frata helpo*, kompilita kaj eldonita de la Slava Komitato kun bonfara celo (por helpi la Balkanajn slavojn en tiutempa milito). La vortojn de Aksakov pri la klereco de la rusa popolo Dostojevskij traktis en la antaŭa ĉapitro de la *Taglibro*.

Verkoj de Dostojevskij en Esperanto

Libroj

Dostojevskij F. *Blankaj noktoj* / Trad. S. Belorukov. — Saratov: G. Davidov, 1915.

Dostojevskij F. *Blankaj noktoj*: [Ses prozaĵoj] / Trad. G. Arosev, A. Birjulin, A. Korĵenkov; Antaŭpar., koment. A. Korĵenkov. — Kaliningrado: Sezonoj, 2002. — (*Rusa literaturo*; Vol. 8).

Dostojevskij F. *Krimo kaj puno*: Romano / Trad. An. Parfentjev; Enkond., koment. A. Korĵenkov. — Jekaterinburg: Sezonoj, 1993. — (*Oriento-Okcidento*; Vol. 28).

Verkoj

Blankaj noktoj / Trad. G. Arosev // Dostojevskij F. *Blankaj noktoj*. Kaliningrado: Sezonoj, 2002.

Blankaj noktoj / Trad. S. Belorukov. — Saratov: G. Davidov, 1915.

Enkonduko [La taglibro de verkisto] / Trad. A. Korĵenkov // *La Ondo de Esperanto*, 1999, N^o5.

Honesta ŝtelisto / Trad. G. Arosev // Dostojevskij F. *Blankaj noktoj*. Kaliningrado: Sezonoj, 2002.

Honesta ŝtelisto / Trad. G. Arosev // *Rusa Novelaro*. Vol. 1. Kaliningrado: Sezonoj, 2003.

Iom pri la mensogado / Trad. A. Korĵenkov // *La Ondo de Esperanto*, 2000, N^o11.

Knabo ĉe Krista abio / Trad. A. Korĵenkov // *La Ondo de Esperanto*, 2004, N^o1.

Knabo ĉe Kristo, je l' abio / Trad. A. Vejtcler // *Lingvo Internacia*, 1899, N^o12.

Krimo kaj puno / Trad. An. Parfentjev. — Jekaterinburg: Sezonoj, 1993. — Fragmentoj aperis en *La Ondo de Esperanto*, 1993, N^o2; 1994, N^o1.

Kristnaska festo de knabo / Trad. G. Janovski // *Esperantisto*, 1893, N^o9.

La centjarulino / Trad. A. Korĵenkov // *La Ondo de Esperanto*, 1999, N^o7.

La kampulo Marej / Trad. A. Korĵenkov // Korĵenkov A. *Fjodor Dostojevskij en Esperanto*. Kaliningrado: Sezonoj, 2005. — Ankaŭ en *La Ondo de Esperanto*, 2003, N^o4.

La sonĝo de ridinda homo / Trad. A. Korĵenkov // *Rusa Novelaro*. Vol. 1. Kaliningrado: Sezonoj, 2003.

La sonĝo de la ridinda homo / Trad. N. Cvileneva // *Scienco kaj kulturo*, 2007, N^o1, 2, 3.

Malriĉaj homoj / Trad. G. Arosev, A. Korĵenkov // Dostojevskij F. *Blankaj noktoj*. Kaliningrado: Sezonoj, 2002.

Misfortuna historio / Trad. A. Birjulin // Dostojevskij F. *Blankaj noktoj*. Kaliningrado: Sezonoj, 2002.

Noticoj el la kelo / Trad. A. Korĵenkov // Dostojevskij F. *Blankaj noktoj*. Kaliningrado: Sezonoj, 2002. — La komenco aperis en *La Ondo de Esperanto*, 2002, N^o7.

Novjara balo kaj nupto / Trad. A. Korĵenkov // *Rusa Novelaro*, Vol. 1. Kaliningrado: Sezonoj, 2003.

Paradoksisto / Trad. A. Korĵenkov // *La Ondo de Esperanto*, 2001, N^o10.

Sozio / Trad. G. Arosev // Dostojevskij F. *Blankaj noktoj*. Kaliningrado: Sezonoj, 2002.

Elektronika libro

Dostojevskij F. *Blankaj noktoj* / Trad. G. Arosev. — Kaliningrado: Sezonoj, 2010. — (*Virtuala Biblioteko*; N^o4). — [Elŝutebla en la prezentomanieroj “pdf” kaj epub” ĉe nia [retejo](#).

Ĉi tiu listo estas nur ĝermo. Ĝi baziĝas sur la materialo de BibLO (Biblioteko de La Ondo). Se vi havas pliajn informojn bonvolu sendi ilin al ni [retpoŝte](#).

Pri ĉi tiu libro

La papera eldono:

Korĵenkov, Aleksander.

Fjodor Dostojevskij en Esperanto: Prelegoteksto. — Kaliningrado: Sezonoj, 2005. — 19 paĝoj. — (Serio Sed ne el katedro; N^o2)

© Aleksander Korĵenkov, 2005.

La papera versio estas aĉetebla ĉe la Libroservo de UEA.

La elektronika eldono:

Aleksander Korĵenkov.

Fjodor Dostojevskij en Esperanto.

Kaliningrado: Sezonoj, 2011.

Virtuala Biblioteko; N^o8.

Ĉi tiu senpaga eldonaĵo estas nur por privata legado,
ne por pludistribuo.

Oni ne rajtas sen permeso de la aŭtoro (Aleksander Korĵenkov)
publikigi ĉi tiun tekston plene aŭ fragmente en iu ajn papera
kaj elektronika formo.

Kontakt-adreso: sezonoj@yahoo.com

Virtuala Biblioteko de Sezonoj

- N^o1. Aleksandr Puŝkin. *La pika damo*.
Tradukis Aleksander Korĵenkov.
Kaliningrado: Sezonoj, 2010. 30 paĝoj.
- N^o2. Anton Ĉeĥov. *Sveda alumeto*.
Tradukis Aleksander Korĵenkov.
Kaliningrado: Sezonoj, 2010. 24 paĝoj.
- N^o3. Edgar Allan Poe. *La falo de la domo Usher*.
Tradukis Edmund Grimley Evans.
Kaliningrado: Sezonoj, 2010. 24 paĝoj.
- N^o4. Fjodor Dostojevskij. *Blankaj noktoj*.
Tradukis Grigorij Arosev.
Kaliningrado: Sezonoj, 2010. 48 paĝoj.
- N^o5. Arthur Conan Doyle. *La ĉashundo de la Baskerviloj*.
Tradukis William Auld.
Kaliningrado: Sezonoj, 2010. 168 paĝoj.
- N^o6. Harrison, Harry. *Naskiĝo de la Rustimuna Ŝtalrato*.
Tradukis Reinhard Fössmeier, Edmund Grimley Evans,
Rob Helm, Konrad Hinsen, Pierre Jelenc, Jorge Llambías,
Kevin Schoedel, Mark Weddell.
Kaliningrado: Sezonoj, 2011. 195 paĝoj.
- N^o7. Nikolaj Gogol. *Palto*.
Tradukis Aleksander Korĵenkov.
Kaliningrado: Sezonoj, 2011. 35 paĝoj.
- N^o8. Aleksander Korĵenkov. *Fjodor Dostojevskij en Esperanto*.
Kaliningrado: Sezonoj, 2011. 33 paĝoj.